OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# Sennaciulo




## Nia dosiero

## Latin-ameriko

## La socialismo de la dudekunua jarcento

Sennaciulo, novembro 2007, n°11 (1229) ,MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

www.satesperanto.org

# Nova projekto de la eldona fako kooperativa: multlingvaj glumarkoj

Antaŭ kelkaj monatoj SAT-Amikaro ekigis grandskalan informkampanjon ĉirkaŭ la temo “per Esperanto por Internacia Solidareco”. En tiu ĉi kadro estis eldonitaj afiŝoj kaj glumarkoj, kiuj jam ornamas la stratojn de kelkaj francaj urboj (vidu la apudajn fotojn). Kompreneble, necesos ankoraŭ atendi kelkajn jarojn ĝis kiam la SAT-rondoj el aliaj lingvoregionoj estos sufiĉe fortaj por investi en samtipa materialo, sed ĝis tiam, jam eblas antaŭvidi, pli modestaskale, produktadon multlingvan de glumarko “Internacia Solidareco per Esperanto”, kun indiko de retadreso.

La glumarko estos en formato 7,5 x 4,5 cm, kaj la produktokvanto por ĉiu lingvo estos minimume 1000 ekzempleroj. Eblos tuj eldoni pli grandajn kvantojn por la lingvoregionoj, kie kamaradoj tion petos. Estus dezirinde eldoni la glumarkon en trideko da lingvoj. Do, jen tuj praktikaj konsekvencoj:

- en ĉiu lingvoregiono estus bone, ke kolektivo da kamaradoj interkonsentu pri la traduko de la glumarko. Estas nur kelkaj vortoj, sed jam inter la kooperativanoj, estas diversaj opinioj pri la respektiva taŭgeco de la vorto “internacia” kaj “tutmonda”. Do, argumentitaj opiniesprimoj bonvenas pri la temo.

- ĉar la glumarko enhavos retadreson, kiun certe vizitos la neesperantistaj




*Afiŝoj en apudpariza urbo Antonio*

aktivuloj (kiuj vidos la glumarkojn apud tiuj, kiujn ili mem gluas pri sia organizo), necesos, ke la reta ligo resendu al paĝo kun informoj pri Esperanto kaj pri SAT en la koncerna lingvo. Tio helpus korekti la ĝis nun iom hontindan konstaton, ke por kelkaj lingvoregionoj, en kiuj aktivas kelkaj el niaj kamaradoj, tute mankas tiulingva materialo en la SAT-retejo. Antaŭ kelkaj jaroj, la poresperanta fako jam produktis du sufiĉe longajn informajn tekstojn. Ili povus ĉu esti rekte tradukitaj, ĉu utili kiel bazon por verkado de pli konciza prezentoteksto. La kamaradoj, pretaj kontribui al la projekto, bonvolu esti en kontakto kun gmickle@nexgo.de, aŭ rekte aliĝi al la dissendolisto de la poresperanta fako: http://groups.yahoo.com/group/SAT-poresperanta-fako/. Kamaradoj sen retaliro uzu la okazon por kontakti rethavantajn kamaradojn el la sama regiono kaj petu ilian helpon. (Jen al kio utilas, i.a., SAT-rondo...). Lasta grava detalo: la materialo estu preta okaze de la kongreso de SAT-Amikaro,




*Ankaŭ en la urbo Pau*

fine de marto, tiel ke la dispartigo de la produktitaĵoj ne estu organizita fuŝe kaj lastminute antaŭ la SAT-Kongreso. Do, ek al!


La eldona fako kooperativa de SAT <eldonkoop@satesperanto.org>





Ankaŭ estos aĉeteblaj la samspecaj glumarkoj.



Karaj gelegantoj,

Jen la novembra numero, iom pli akurate ol la antaŭa, kun ampleksa dosiero pri la socipolitika situacio en Sudameriko. Notinde estas, ke ne ĉiuj senditaj kontribuaĵoj, pri la dosiero aŭ pri aliaj temoj, estas jam publikigitaj pro spacomanko. Jen kuraĝiga konstato, kiu ebligas veran redaktan laboron, kaj ne nur enpaĝigon de ĉio ajn sendita. Interkonsente kun la PK, laŭ la deziresprimo de la pasintkongresa gvidrezolucio, estis decidite provi la produktadon de duoblaj numeroj en januaro-februaro kaj majo-junio. Kompreneble, tiuj ĉi dumonataj numeroj estos duoble pli dikaj. La celo ne estas malpliigi la servon al la membroj (male, certe aperos SR antaŭ la venonta kongreso, kaj ankaŭ estas pristudata la reaperigo de papera adresaro...), sed elprovi alian sistemon, kiu devus ebligi la produktadon de pli kvalita gazeto, ĉar la kontribuantoj kaj redaktantoj disponos pri iom pli da tempo por poluri siajn intervenojn.

Kamaradoj, kiuj timas malfortigon de la kontakto kun SAT pro tiu dumonateco, memoru ke membreco en SAT ne limiĝas al pasiva ricevado de la revuo. Se la tempo ŝajnos al vi tro longa antaŭ la ricevo de la duobla numero, profitu la okazon por revigligi SAT-rondon en via regiono.

La venontaj dosiertemoj estos:
- en decembro :
**Sano : perfortita homa rajto**
Kontribuaĵojn sendu al :
pimskrabo@yahoo.fr

MARKOVO Vito, 4 rue Beaubourg,
FR-94100 Saint-Maur des Fossés.

- en januaro/februaro :
**Kelkaj aspektoj de nuntempa agrokulturo**
Kontribuaĵojn sendu al :
robin.beteau@laposte.net

BETEAU Robin, chez Bulanat,
Quartier Oussan,
FR-65130 ESCOTS
Kamaradece,

La Redakta skipo

***NIA DOSIERO :***

## Politika situacio en Latina Ameriko

# La bolivia veto

Publikigita en la meksika ĵurnalo La Jornada la 7an de oktobro 2007.

Ferdinand Lassalle, juristo kaj konstituciisto, iam asertis ke la konstitucio estas papero en kanonbuŝo. Tio estas, nur adekvata forto-rilato povas aprobigi konstitucion aŭ altrudi ĝian obeadon. En Bolivio, la registaro de Evo Morales ĝuas nekontesteblan aprobon ĉar la indiĝenoj kaj la malriĉuloj ĉiam konsistigis la plimulton kaj nun ili subtenas la politikon de sia indiĝena kaj popola registaro fronte al Vaŝingtono kaj la petrolo-firmaoj, kaj subtenas ĝian batalon kontraŭ la rasismo kaj la secesiismo de la k'aras el Sankta Kruco, kaj ankaŭ ĝian decidon igi Bolivion multetna ŝtato bazita sur la regiona aŭtonomeco.

Tamen, la Konstitucianta Asembleo, kie la registaro havas plimulton, stagnis kaj ne povis aprobi eĉ unu solan artikolon. La difino de aŭtonomeco, kiun la dekstro kaj la regionaj registaroj de ĝi kontrolitaj (Sankta Kruco, Beni, Pando, Cochabamba, Tarija) celas igi kvazaŭ sendependecon disde la cetera Bolivio gvidata el La Paz, ĝia ĉefurbo, estis unu el la ĉefaj gordiaj nodoj. Alia naskiĝis el la sukcesa manovro de la dekstro kontraŭmeti malriĉulojn kontraŭ malriĉuloj, indiĝenojn kontraŭ indiĝenoj, debatigante en la Asembleo la problemon de la sidejo de la registaro (la ĉefurbeco), ĉar Sucre postulas la translokigon tie de la ĉefurbo kaj de la ministrejoj.

Ambaŭ nodoj estas gordiaj, ĉar ili estas nesolveblaj, kvankam la problemo de la kontraŭstaro inter Sucre kaj La Paz por la ĉefurbeco estas duonsolvebla koncedante, salomone, la distribuon de la ministrejoj kaj de la povoj inter ambaŭ urboj. La usona ambasadejo troviĝas malantaŭ tiuj konfliktoj celantaj malstabiligi la registaron de MAS (Movado al Socialismo) kaj estas malantaŭ la armiĝo de grupoj paramilitistaj en Sankta Kruco kiuj uzas la perforton kontraŭ la indiĝenoj de la bolivia oriento kaj kontraŭ tio kion ili nomas Bolivio (tio estas, la zono de plimulto indiĝena, al kiu ili kontraŭstaras la nacion camba de la mestizaj kaj blankaj sanktakrucanoj). Kaj estas evidente ke Vaŝingtono troviĝas ankaŭ malantaŭ la ekonomia povo de la secesiistoj, tiu de la terposedantoj kaj soj-fabistoj argentinaj kaj brazilaj, kaj tiu de la fremdaj petrolo-firmaoj kiuj preferas traktadi kun iliaj servutuloj (aŭ aliancanoj) de la oligarkio la prezon de la gaso kaj la petrolo.

La situo de tiuj naturaj rimedoj en la orientaj zonoj instigas la secesiismon de la tieaj elitoj, kiuj krome estas rasismaj kaj malamas, timas kaj malestimas la indiĝenojn kiuj, por ili, ne estas sampatrianoj sed balasto. Al la akuta interregiona konflikto aldoniĝas perforta klasbatalo kaj la konflikto inter la intere-

Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T
Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN :FR41 1000 0101 2342 2K02 064 - BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
**Plenum-Komitato de SAT** :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Krešimir Barković
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Jacques Bannier, Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent.

**Redakta Komitato** - Cyril Orsingher,Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Vito Markovo, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, Jacques Schram, Hans Georg Kaiser, Pablo Foche. Provizora ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto: Krešimir Barković. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

9 771163 044279

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.